Johann Wolfgang von Goethe,

# Elf-reĝo

*tradukita de Antoni Grabowski*

Kiu rajdas tra nokt', kun vent' pro l' vet'?
Jen estas patro kun infanet':
Li havas knabon en zorga pen',
Lin tenas varme en ĉirkaŭpren'.

"Filet', vi kial ektremis pro tim'?"
"Patreto, jen! elfreĝ' en proksim'!
La elforeĝo, kun vost' kaj kron'!"
"Filet', ĝi estas nebulzon'."

"Ho venu do, infan' al mi!
Mi belajn ludojn ludos kun vi:
Ĉe l' bordo brilas kolora flor',
Mia panjo havas vestojn el or'!"

"Patret', ĉu vi aŭdas, ho mia patret',
Kion promesas elfreĝ' en sekret'?" —
"Ne timu, filet', ne timu vi,
Murmuras vent' en velka foli'."

"Knabeto bela, sekvu min',
La filinoj miaj vartados vin'.
La filinoj, lertaj en danca rond-form',
Kantante, dancante vin lulos al dorm'."

"Patret', ĉu vi vidas, patret", mia kar'?
En lok' malhela jen elfinar'!"
"Filet', filet', mi vidas precize: [2]
Maljunaj salikoj ŝajnas jen grize."

"Mi amas vin, ĉarma vi, mia knabet',
Se mem vi ne iros, mi prenos sen pet'!"
"Patreto, patreto, li prenas min for!
Elfreĝo kaptas min, ho dolor'!"

. . .

Johann Wolfgang von Goethe,

# Erlkönig

Wer reitet so spät durch Nacht und Wind?
Es ist der Vater mit seinem Kind;
Er hat den Knaben wohl in dem Arm,
Er fasst ihn sicher, er hält ihn warm.

Mein Sohn, was birgst du so bang dein Gesicht? —
Siehst, Vater, du den Erlkönig nicht?
Den Erlenkönig mit Kron' und Schweif? —
Mein Sohn, es ist ein Nebelstreif. —

„Du liebes Kind, komm, geh mit mir!
Gar schöne Spiele spiel' ich mit dir;
Manch' bunte Blumen sind an dem Strand,
Meine Mutter hat manch gülden Gewand." —

Mein Vater, mein Vater, und hörest du nicht,
Was Erlenkönig mir leise verspricht? —
Sei ruhig, bleibe ruhig, mein Kind;
In dürren Blättern säuselt der Wind. —

„Willst, feiner Knabe, du mit mir gehn?
Meine Töchter sollen dich warten schön;
Meine Töchter führen den nächtlichen Reihn
Und wiegen und tanzen und singen dich ein." —

Mein Vater, mein Vater, und siehst du nicht dort
Erlkönigs Töchter am düstern Ort? —
Mein Sohn, mein Sohn, ich seh' es genau:
Es scheinen die alten Weiden so grau. —

„Ich liebe dich, mich reizt deine schöne Gestalt;
Und bist du nicht willig, so brauch' ich Gewalt." —
Mein Vater, mein Vater, jetzt faßt er mich an!
Erlkönig hat mir ein Leids getan! —

. . .

[2]Mi, Manfred Retzlaff, proponas por tio, ke la rimvortoj estu – same kiel en la originale – akcentataj sur la lasta silabo, jenan ŝanĝon:
„Fileto, precize mi vida ĝin:
La grizaj salikoj jen trompas vin."

La patro ektremis, kun granda rapid'
Li rajdas, kaj plende en brak' ĝemas l' id'.
Alvenas patr' al hejma kort',
L' infanon prenis jam for la mort'.

*Traduko de la Germana poemo "Erlkönig" de* JOHANN WOLFGANG VON GOETHE *(*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* ANTONI GRABOWSKI *(*1857-06-11 – †1921-07-04).*

*Arg-588-1694 (2013-02-26 14:50:24)*

Dem Vater grauset's; er reitet geschwind,
Er hält in Armen das ächzende Kind,
Erreicht den Hof mit Mühe und Not;
In seinen Armen das Kind war tot.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* JOHANN WOLFGANG VON GOETHE *(*1749-08-28 – †1832-03-22).*

*Arg-588-1185 (2013-02-26 14:59:44)*

*Pri la verkinto vidu la retejon* `http://de.wikipedia.orgwikiJohann_Wolfgang_von_Goethe`*, pri la tradukinto la vikipediejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Antoni_Grabowski`*. Pri la balado vidu:* `http://de.wikipedia.org/wiki/ErlkГynig_(Ballade)`*. La muzikon, kiun verkis la germana komponisto Franz Schubert, oni povas aŭdi en la reta video* `http://www.youtube.com/watch?v=e40Mm8baD7A`*. Pri la komponisto informiĝu en* `http://de.wikipedia.org/wiki/Franz_Schubert`*-*